

## **LI KOMENCIS SENDI ILIN – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

### **El la evangelio laŭ Marko 6, 7-13**

**En tiu tempo Jesuo alvokis al si la dek du apostolojn, kaj komencis sendi ilin duope tien kaj aliloken. Li donis al ili aŭtoritaton super la demonoj, kaj diris: «Por la vojaĝo nenion alian portu krom bastono; nek panon, nek ŝultrosaketon, nek monon en la poŝo; iru kun sandaloj, sed ne surmetu du tunikojn». Kaj Li aldonis: «Enirante domon, tie loĝu, ĝis venos horo por foriri el tiu loko. Kaj se en iu vilaĝo oni vin ne akceptos, nek aŭskultos, foriru deskuante la polvon el viaj piedoj: tio estos gesto kontraŭ ili». Tiam la dek du foriris. Ili predikadis pentofaron, elpelis multajn demonojn kaj resanigis multajn malsanulojn, ŝmirante ilin per oleo.**

Post la malsukceso de Jesuo dum la predikado en la sinagogo, kie li estis akceptata skeptike kaj Jesuo mem miris pro ilia nekredemo, Jesuo aligas en sia agado la dekdu. La dekdu estas la disĉiploj kiuj reprezentas la novan Izraelon, kiu ĝuste konsistis el dekdu triboj.

*"Jesuo komencis sendi ilin"* skribas Marko, *"duope"*, ĉar ili konsistigas komunumon, ne prezentiĝas kiel estroj aŭ heroldoj, sed ili devas esti komunumo kiu travivas tiun ĉi mesaĝon. Kaj *"Li donis al ili aŭtoritaton super la demonoj"*. Spirito signifas energion, forton; kiam tiu forto venas de Dio ĝi nomiĝas Sankta, ne nur pro la kvalito, sed pro la agado kiu disigas la homon disde la sfero de la malbono kaj de la peko kaj lin altiras en tiun de la bono. Kiam tiuj energioj venas de realo malsama ol Dio, aŭ eĉ kontraŭa, ili nomiĝas malpuraj, ĉar ili retenas kaj lin plutenas en la sfero de la malpuro, tio estas de la neeblo komuniki kun Dio – laŭ la tiuepoka kulturo.

*"Kaj diris"* – ĝi estas la nura fojo dum kiu li ordonas ion en tiu ĉi Evangelio, do devas temi pri io tre grava, kion ni devas taksi serioze. Kion

Jesuo ordonas? *“Por la vojaĝo nenion alian portu krom bastono; nek panon, nek ŝultrosaketon, nek monon en la poŝo”*.

Kial ĉi tio? Ĉar la vivo de la disĉiploj devas montri la verecon de la anonco. Oni ne povas iri anonci la bonan novaĵon de Jesuo, kiu estas novaĵo en kiu la homo plenfidus je Dio kaj plenfidus je la aliaj, mesaĝo kiu estas rezigno je ambicio, se poste propra konduto, propra vestmaniero, propra vivostilo ĝin kontraŭdiras. La vivo de la anoncanto de la mesaĝo do devas montri la veron.

Jesuo do, kiu kutime estas avara je priskriboj, en tiu ĉi kazo priskribas tre detale, eĉ kia devas esti la vestmaniero de tiuj disĉiploj; li diras “iru kun sandaloj” – la sandaloj, ĉar ili devas longe paŝi – sed “ne surmetu du tunikojn”, havi du tunikojn estis luksaĵo por riĉuloj. La disĉiploj do ne devas dementi per sia konduto la anoncon de tiu universala amo de iu Dio kiu sin metas je la servo de la aliaj.

Poste Jesuo invitas tiujn disĉiplojn esti liberaj je ekonomia zorgo, tute konfidi sin; li diras ke ili devas esti liberaj ankaŭ ene, kaj fakte diras *“Enirante domon, tie loĝu, ĝis venos horo por foriri el tiu loko”*. Kial tiu indiko? Ĉar la hebreoj vojaĝante ofte serĉadis gastigon nur ĉe hebreaj domoj, ili ne gastis ĉe pagana domo. Kial? Ĉar la domo de iu pagano estis malpura. Ankaŭ ili ne iris hejmen de hebreoj, pri kiuj ili ne certis ĉu tiuj estis tute obeantaj la normojn pri pureco aŭ pri malpureco rilate la manĝaĵojn.

Nu, Jesuo petas ilin esti liberaj; en la domo kien vi eniras, ĉu ili estas observantaj aŭ ne, tie restu. Oni devas do esti liberaj por povi liberigi. *“Kaj”* atentigas Jesuo *“se en iu vilaĝo oni vin ne akceptos, nek aŭskultos, foriru deskuante la polvon el viaj piedoj”*. Tiu estis simbola gesto kiun faris la hebreoj, kiam ili revenis de pagana teritorio, antaŭ ol eniri Israelon, ili deskuis la polvon de la sandaloj por ne porti eĉ ereton de pagana tero, malpura tero, en la sanktan teritorion. La evangeliisto do indikas ke tiuj kiuj ne akceptas tiujn anoncantojn de la mesaĝo, estos traktendaj samkiel paganoj.

Pagano do ne estas tiu kiu ne kredas aŭ tiu kiu kredas je alia religio, sed tiu kiu ne gastigas, kiu ne helpas. Kiu ne reflektas en sia konduto la universalan amon de Dio, tiu estas pagano. Jesuo do sendas la disĉiplojn anonci tiun mesaĝon de la bona novaĵo, kaj tiuj kiuj ne ilin akceptas, devas esti traktataj kiel paganoj; “pagano” do ne dependas de la Dio en kiu oni kredas, sed de la sinteno de akcepto kaj gastigado.

*"Tiam la dek du foriris"* – jen ĉi tie oni devas sin demandi "sed ĉu ili faris tion kion Jesuo diris al ili fari aŭ ne?". Ĉar Jesuo ne invitis la disĉiplojn prediki la konvertiĝon, kaj eventuale la konvertiĝo estis por la regno de la ĉielo, ne ilin invitis forpeli la demonojn, li donis la povon super la malpuraj spiritoj, kio estas alia afero, kaj ŝmiri la malsanulojn per oleo, ktp.

La disĉiploj ne faris tion kion Jesuo indikis al ili. Kaj fakte ni vidos en la sekvo de tiu ĉi Evangelio ke Jesuo ilin vokos flanke kaj malpermesos al ili anonci mesaĝon kiun li ne rajtigis.